


K

KASTELO MÜNCHENWILER

En 1954 la svisaj e-istoj (pli precize: SES) ekprofitis la proponon organizi dusemajnan lingvoferian Eo-kulturaranĝon en la nobelbieno Münchenwiler (franclingve: Villars-les-Moines) apud Murten/Morat. Kiel posedajo de la berna kantono K. estas disponigata al la berna popola altlernejo por la klerigo de ĝiaj civitanoj. La specifa filozofio de la kursoj en K. baziĝis sur la harmonia unuiĝo de aspektoj, kiuj estas neglektataj en la ĉiutaga vivo: distro kaj kleriĝo, okupiĝo pri tio, kio estas ĝojiga kaj interesa, serena societemo inter samideanaj homoj. Al tiu idea fono de la K., kiu pretendis iĝi centro de la homeca kulturo, konvenis la kursa koncepto de → *William Perrenoud* (1898-1984), kiu prezentis sian → *geonism*, priskribitan en la kunteksto de la filozofio de K. jene: „La feria semajno en K. ne estas nur ia kurso inter aliaj samsencaj kaj samcelaj. Ĝi havas apartan signifon, ĉar ĝi pretendas krei ion novan, kio iom post iom ĝermos kaj kreskos. La orientado de la kurso rezultas de zorga analizo de la nuna fazo de l'mond-historio... Al ĉiu observanto estas klare, ke en la nuna mondo la streĉo inter Oriento kaj Okcidento (t.e. USSR kaj Usono) fariĝis supermezura, kaj ke tiu streĉo mem, laŭ la leĝoj de l'historia evoluo, naskos ekvilibriĝan reagon. Tiu reago estas la volo al interkompreniĝo, la volo al pozitiva kunagado. En la tuta mondo ekzistas neniu rimedo por esprimi tiun volon en pleneco krom Eo. Sed tiom multege da homoj ankoraŭ ne konscias, eĉ inter ili multe da e-istoj! Klarvidantoj devas briligigi tiun konscion tiel forte, ke ĝi trudu sin eĉ al kontraŭuloj de paco kaj konkordo. Bonvoluloj estas tre multaj en la mondo, sed la pozitiva efektivigo de ilia laboro restis ĝis nun problemo pro manko de

pensa kaj lingva bazoj. Trovi la minimuman bazon de interkonsento - jen la unua necese-co.”



Eo-programprospekto pri Kastelo Münchenwiler



Kursanoj kaj gastoj en Kastelo Münchenwiler en 1955

En 1954, pro tro malmultaj aliĝoj, la CK de SES ankoraŭ devis rezigni pri la okazigo de la kursaro. Sed des pli sukcese ili realiĝis unuafoje en aŭgusto de la posta jaro kun 20 partoprenantoj. Poste la nombro de aliĝoj eĉ daŭre altiĝis, ĉar la aranĝo allogis ankaŭ kursanojn el eksterlando, i.a. la eldoniston de Stafeto, profesoron Juan Régulo Pérez el Kanariaj Insuloj (1960). William Perrenoud,

la direktoro de la kursoj, organize helpata de sia edzino Daisy kaj de →Hanni Fischer-Buri de la →Svisa Eo-Instituto en Berno, aplikadis sian →*Oran metodon*. Aliaj ĉefaj prelegantoj kaj kontribuantoj estis →Edouard Waldvogel, →Arthur kaj Heidi Baur, →Otto Walder, →Charles Ecabert, →Bruno Graf, →Hans Hermann, Ida Wittenberg kaj René Zollinger. Sub la kontrolo de →Marcel Jaccard, →William Perrenoud, →Jakob Hohl kaj Paul Humberset efektiviĝis ankaŭ la ekzamenoj de SES kun atribuo de la atesto pri lernado kaj la supera diplomo. Ekskursoj okazis al la Lago de Murten kaj al Avenches. Poste la pli kaj pli fanatika geonisma sinteno de Perrenoud kaŭzis malkreskon de la kursanaro, kaj la morto de Hanni Fischer en oktobro 1961 signifis praktike la finon de la kursoj en K. Diversaj regionaj kunvenoj de SES kaj unu KELI-kongreso (1957) disvolviĝis en K.

Walter KOBELT

*1910. *Loĝas en Arbon TG*



Post la baza kaj duagrada lernejoj K. lernis la metion de seruristo (1925-29) kaj en kurso fakiĝis pri gaz- kaj akvoinstalaĵoj (1934-35). En 1945 li finis sian kleriĝon pri maŝinkonstruado per koresponda kurso ĉe la teknika instituto Onken en Kreuzlingen/TG. En sia aktiva profesia vivo K. laboris diversloke kiel seruristo, instalisto, muntisto de hejtiloj, mekanikisto de flugmaŝinoj (en Altenrhein/SG), ekde 1948 ĝis sia emeritiĝo en 1975 ankaŭ kiel maŝinkonstruisto kaj -desegnisto de teksaĵ- kaj brodmaŝinoj en la firmao Saurer.

K. fariĝis e-isto en 1931/32 post partopreno en Eo-kurso de la ĝeneva laborista EK,

gvidata de →Madeleine Stakian. Post la berna UK (1939) K. organizis Eo-semajnon en svisa popol-altlernejo sur Herzberg en Argovio. En 1941 li kunfondis, i.a. kun →Fritz kaj Hanny Liechti, la EG Rheineck/SG, kiu tamen ne ekzistis tre longe. En 1943 K. aliĝis al la Turista Asocio de la Naturamikoj (TANEF), en kies revuo *Der Naturfreund* li sukcesis aperigi Eo-rubriketon kaj poste ankaŭ Eo-kurson. En 1946 K. iĝis dumviva membro de Universala Ligo (de Andreo Cseh). En 1947 li organizis Eo-feriadon en la naturamika domo Reutspierre super Meiringen/BE, kiun partoprenis pluraj eksterlandaj gesamideanoj. Post longa interrompo de sia Eo-aktiveco K. reaperis en la Eo-movado, kiam li aŭdis pri la ekzisto de KCE. En la 1970aj jaroj K., kiu en 1975 forlasis la oficialan protestantan eklezion serĉante sian viv-enhavon per filozofio, esoterismo, jogo, vegetarismo k.s., korespondis kun hindaj e-istoj (Vyas, Yashovardhan, Daŝgupto). El tiuj kontaktoj rezultis la eldono de lingvogvidilo Eo-hindia. Alia simila projekto estis la analoga lingvogvidilo malagasa. Krome K. lanĉis kelkajn flugfoliojn, verkis artikolojn (por *Monato*, *HdEo* k.a.) kaj partoprenis Eo-kongresojn. Pri la efikeco de la celaro de UEA K. havis dubojn.

→Instruado

KRISTANOJ

Ofte eklezianoj alvenis al la konstato, ke la latina aŭ nacia lingvo kiel la franca aŭ la germana ne estas sufiĉa en la interlingvaj rilatoj. Pro tio pluraj ekleziuloj efektivigis planlingvajn esplorojn kun la celo proponi tutmondan lingvon. La plej fama ekzemplo tiurilate estas la katolika pastro Johann Martin Schleyer (1831-1912), kiu inventis la lingvon Volapük. La valeza aŭgusteno →Jules Gross (1868-1937), la katolika pastro →Adolphe Creux (1876-1933) en Rue/FR kaj la protestanta pastro →Friedrich Schneeberger (1875-1926) dediĉis sian vivon al Ido, dum en Grizono la benediktano →Flurin Maissen (1906-99) iam instruis la planlingvon Occidental en Disentis/GR kaj →Paolo Castellina okupiĝis pri Interlingua. Estas do normale, ke la adeptojn el plej diversaj eklezioj allogis la planlingvaj projektoj ne nur

pro sia universaleco, sed ankaŭ kiel rimedo al la disvastigo de sia kredo.

Per sia hilelismo-homaranismo la judo L.L. Zamenhof (1895-1917), aŭtoro de Eo, antaŭvidante „neŭtralan religion“, klare alproksimiĝis al la sferoj de religieco, ne ĉiam je la plaĉo de siaj adeptoj, kiuj estis malpli religiemaj, kaj ankaŭ ne ĉiam je la ĝojo de katolikaj samideanoj, kiuj ne deziris novan religion, vidante en la zamenhofa verko pli la neŭtralan lingvon ol la ideologio. → *Ernest Naville* (1816-1909), la fama kristana filozofo, evangelia teologo kaj moralisto, tre interesiĝis pri la demando de la neŭtrala universala lingvo kaj morale apogis la unuajn Eo-pionirojn en Ĝenevo, Svislando kaj Francio. La konata psikiatro, reformisto kaj pacpledanto → *Auguste Forel* (1848-1931), kiu same apogis la neŭtralan universalan lingvon, proklamis sin bahaano. Kun la apero de Eo iom post iom formiĝis ankaŭ fakaj asocioj reliegiecaj.

La unua protestanta diservo okazis dum la 2a UK en Ĝenevo la 2an de septembro 1906 je la 8h30 matene en la Templo de l'Aŭditorio apud la katedralo. Pastoro Friedrich Schneeberger eldonis la tekston broŝuroforme laŭ la originalaj manuskriptoj kaj stenografiaj notoj.

Internacia Katolika Unuiĝo E-ista (IKUE): Komence de la svisa katolika movado e-ista staris la *Svisa sekcio de IKUE* (fondita en 1910), kiu estis iniciatita en 1913 de → *Hans Joachim Unger* (1894-1984), kaj fondita en Zug (hotelo Hirschen), kie ĉeestis ankaŭ la neŭsatelano *Jean Perriard* (1889-1975), kiu estis membro de la Kristana Unuiĝo de junaj viroj (YMCA). La celo de la nova asocio estis unuigi la katolikojn, defendi iliajn ĝeneralajn interesojn kaj praktiki Eon. Kunfondantoj kaj unuaj estraranoj estis *J. Lehner*, advokato el St. Gallen, kiu faris la inaŭguran paroladon dum la fondkunveno, *W. Arnold* de la porinstruista lernejo en Zug kaj unua prezidanto de la sekcio, *Hilfiker*, muzik-instruisto en Zug kaj unua sekretario de la sekcio, kaj *Oscar Flühler* de la porinstruista lernejo en Schwyz.



Wilhelm Flammer

Josef Koch, ege aktiva e-isto, kiu en 1946 revekis la lucernan EG, kaj kiu poste loĝis en Fislisbach/AG, fondis en 1958 kun tri kolegoj la asocion *Svisa Katolika Unuiĝo Esperantista (SKUE)*. Kiel akra kontraŭkomunisto, Koch provis konvinki IKUE-n, ke ĝi praktiku saman sintenon en *Espero Katolika*. *Paul Scherer* (*1933) el Emmenbrücke/LU fariĝis la svisa reprezentanto de IKUE ĝis proksimume 1964. Tiam → *Wilhelm Flammer* (1909-77), pastro en Zürchersmühle-Urnäsch/AR, sekretario kaj redaktoro de IKUE, transprenis la taskon de la prezidanto de SKUE. Flammer verkis *Katolikan Terminaron* (1963) kaj, kunlabore kun tri aliaj e-istoj, tradukis la enciklikon *La surtera paco* de papo Johano XXIII. Kun → *William Perrenoud* Flammer tradukis en 1965 ankaŭ la papan enciklikon *La vojoj de la eklezio*. En 1966 li organizis la IKUE-kongreson en St. Gallen, en 1967 kunaranĝis la regionan kunvenon de SES en WIL/SG kaj en 1977 predikis dum la trilanda renkontiĝo en Bregenz (Aŭstrio). Post la forpaso de Flammer, en aŭgusto 1977, cetere pro motorcikla akcidento, anstataŭis lin inter la membraro patro *Franz Bommer* (*1921), ano de la marianista komunumo en Martigny/VS, laste en Si-on/VS. En 1979 Bommer transprenis la prezidon de SKUE kaj la landan reprezentadon. Iam (ĉ. 1981) li instruis Eon en la kolegio St-Marie en Martigny/Martinach. Ĉiujare Bommer dissendis cirkuleron. Kiam li malsaniĝis en la 1990aj jaroj, la agado de SKUE malfortiĝis kaj la membro-nombro de SKUE ŝrumpis al ses personoj. *Paul Scherer*, kiu dum multaj jaroj estis SKUE-kasisto kaj en la

70aj jaroj deĵoris ankaŭ kiel kasisto de IKUE, interkonsente kun la membroj kaj la centra oficejo de IKUE en Romo, realigis la malfondon de SKUE en 2002.



Bommer dum la KELI-IKUE kongreso en 1981

Kristana Eo-Ligo Internacia (KELI): La protestanta Eo-movado komenciĝis en 1907, kiam barono von Starck, Ĝenevo, publikigis artikolojn pri Eo en germanaj protestantaj gazetoj. Post la apero de *Dia Regno* en 1909 kaj dum la antverpena UK en 1911, la protestantaj e-istoj decidis efektiviĝi la fondon de KELI, kiu estis konfirmita dum la berna UK en 1913. La svisa sekcio de KELI estis starigita la 4an de marto 1951 dum la SES-tagoj en Zuriko. Kiel prezidanto elektiĝis →*Fritz Liechti-Kilchhofer* (1913-2001), kiu prezidis la svisan KELI-sekcion ĝis 1977, la ceteraj estraranoj estis →*Lina Reutemann-*


Klee (kasistino), →*Edouard Waldvogel*, *Elisabeth Walder* kaj *Hans Wyss*, Losone/TI, redaktoro de *Kristana Bulteno* dum 1973-86, la organo de la svisa sekcio de KELI. En la dua duono de la 1950aj jaroj sekretario kaj kursgvidanto de la svisa sekcio de KELI estis *Marcel Moreillon* (1907-2004), UEA-delegito de UEA. En 1978 la svisa KELI-sekcio estis prezidata de *Ruth van Puijenbroek-Walder* (*1947), kaj ĝia estrino inter 1980-86 estis *Elisabeth Walder-Guggenbühl* (*1919).

La kontaktoj inter SKUE kaj la svisa KELI-sekcio jam komenciĝis en 1958, sed ili estis neregulaj kaj neoftaj. Tamen en la jaroj 1980, 1982 kaj 1984 realiĝis komunaj semajnfinoj. Iom signifaj KELI-aranĝoj okazis en Rüdlingen/SH (1953), Münchenwiler/BE (1957), Boldern/ZH (1965), Bienenberg-Liesberg (1979) k.a.

Iamaj KELI-anoj nomiĝis *Samuel Leuenberg* (1872-1964), *Ida Leuenberg-Burkhard* (1880-1959) el Bazelo kaj *Elisabeth Steinmann* (1883-1970) el Rubigen/BE. Aktiva membro de KELI estis ankaŭ la menciita protestanta teologo kaj pastoro →*Edouard Waldvogel* (1893-1994), multflanka kristana kaj pacaktivulo kaj frua e-isto.

Alia menciinda pastoro kaj e-isto nomiĝis *Jean-Rodolphe Laederach* (1910-2005), kiu loĝis en Peseux/NE. Post la duagrada lernejo en Porrentruy/JU, la porinstruista lernejo en Berno, la gimnazio en Neŭŝatelo kaj la universitato en Berlino (Germanio), *Laederach* fariĝis instruisto kaj poste elektis la profesion de protestanta pastoro kun la rezidejoj *St-Imier/BE*, *Les Brenets/NE* kaj *Serrières/NE*, tie dum 30 jaroj. (→*Neuchâtel*)

Ekde la 1990aj jaroj *Marie-Louise (Marilou) Münger-Ackermann* (*1945) en Môtiers/NE, kiu estas teologino kaj diakonino (protestanta) de la neŭŝatela eklezio, estas la oficanta prezidantino de KELI. Ŝi organizis KELI-kongreson en *Le Louverain/NE*. *Norbert Martin* (*1945) aktivis kiel universitata pastoro en *Neuchâtel*.



Jean-Rodolphe Laederach


Okazintaj naciaj kaj internaciaj kristanaj Eo-aranĝoj, precipe ekumenaj, en Svislando estis partoprenataj ankaŭ de la germanaj aktivuloj Adolf Burkhardt (1929-2004), luterana pastoro, prezidanto de KELI inter 1961 kaj 1975 kaj denove de 1981 ĝis 2000, kaj de la katolika pastro Bernhard Eichkorn (IKUE).

Du aktivaj K. nomiĝas → *Guido Appius* (*1933), kiu kiel ano de la kristandemokrata popolpartio kaj deputito de la kantona parlamento en Bazelo (1980-92) okupiĝis pri la problemoj de la maljunuloj, pri leĝofarado kaj misuzo de la generada teknologio.




Pastoro Norbert Martin, diakonino Marilu Mürger

Post siaj universitataj kaj seminariaj studoj, *Willy Nüesch* (*1927) fariĝis en 1951 pastoro en la Komunumo de Kristanoj kaj laboris en tiu funkcio en Nürnberg, Zuriko, Essen kaj Rendsburg, ĝis kiam en 1966 li alvenis en Berno, kie li vivas ĝis nun. Nüesch, kiu lernis Eon meze de la 1940aj jaroj kaj trapasis la superan ekzamenon en 1946, tradukis kaj eldonis ĉefajn antropozofiajn verkojn de Rudolf Steiner (1861-1925) en Eon. (→Berno) Kiel iama internacia sekretario de la Kristana Unuiĝo de junaj viroj (YMCA) kun ĝia centro en Ĝenevo oficis *Rodolphe Horner* (1865/6-1927), aktiva ĝeneva e-isto. *César Amaudruz* (1894-1975) estis ano de la t.n. Internacia Fratara Kristana.



Pastoroj Edouard Waldvogel kaj Willy Nüesch



La revuo *Espero Katolika* (5/1981) montras la polan papon Johano Paŭlo II, kiu kutimis salutis en Eo

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA (KCE)



KCE/GEP, domoj Naville (dekstre) kaj Bovet (suda flanko)

'Prasugestoj': La revo pri propra kultur-centro, kie la e-istoj povu kunveni por kleriĝi kaj pasigi sian libertempon kulture kaj de kie disvolviĝu ankaŭ planita Eo-propagando, dekomence okupis la menson de la Eo-adeptoj. Unuaj sugestoj pri Eo-feriejoj datas jam ekde la komenco de la 20a jarcento. Dume por siaj kulturaj kaj klerigaj aktivecoj la svisaj e-istoj kontentiĝis pri la luado de fremdaj kunvenejoj ĉu kadre de la skiferioj en Adelboden (1956-77), ĉu dum la Internaciaj Eo-Feriosemajnoj de SAEF (1959-77), ĉu por la internaciaj ferioj en →Kastelo Münchenwiler (1954-61) aŭ la regionaj semajnfinoj organizitaj de SES.

Idea bazo de K.: La fundamento por la konkreta konstruado de la Eo-institucioj ekzistantaj en La Chaux-de-Fonds ŝuldiĝas al analizo pri la situacio de la Eo-movado, kiun efektiviĝis EES kun →*Edmond Privat* ĉirkaŭ la jaroj 1960/61. Privat, kiu estis fondita en 1910 Internacian Eo-Instituton (IEL, sidejoj en Ĝenevo, Parizo kaj Novjorko; refondita en 1930 kiel Cseh-Instituto) konstatis, ke ankaŭ la Somera Universitato en Eo, lanĉita de li kadre de la 17a UK (Ĝenevo 1925), bedaŭrinde restis enfermita en tiu kongreso. Pro tio kaj ĉar post la dua mondmilito IEI ne plu funkciis, Privat opiniis necese denove prepari Eo-altlernejon, kiu estu memstara. Alia konkludo de tiu analizo estis, ke la Eo-movado povos progresi nur kiam la poresperanta aktiveco emancipiĝos de la diletanta laboro

kaj efektiviĝos en propraj institucioj kun konkreta kaj celtrafa strategio.

Por ke tia altlernejo (kia ĝi de 1976 estis IFA de K.) povu profesie labori, Privat opiniis necese starigi a) dokumentejon aŭ arkivejon konsulteblan de la studentoj interesataj pri interlingvistiko (tiucele instaligis →CDELI); b) kulturajn centrojn aŭ altlernejojn, kiu ebligu al ĉiuj kursanoj rapide lerni Eon kaj kiu malfermiĝu al kulturaj aktivecoj. Ambaŭ institucioj prefere situu samloke.



Vojmontrilo al KCE/GEP (fotis A. Künzli)

Fondo de K. en 1968: La 15an de decembro 1968, je la zamenhofa tago, estis fondita en Biel-Bienne (restoracio Farel) la asocio *Kultura Centro E-ista* sub la aŭspicio de SES, ĉar K. komprenis sin i.a. kiel paralelan branĉon al la SES-trunko por plenumi kulturajn celojn de la svisa e-istaro (la rilatoj inter SES kaj K. estis poste ne ĉiam glataj).

La fondkunvenon partoprenis la sekvantaj Eo-aktivuloj: →Paul Bächli (kasisto de SES), →August Braun (Hauterive/NE, kunvena prezidanto), →Marcel Erbetta (→Grajnoj en vento), Robert Frochaux (EG La Chaux-de-Fonds), →Claude Gacond (sekretario de EES kaj EG La Chaux-de-Fonds, arkivisto de CDELI kaj SRI-prelegisto), →Hans Herrmann (prezidanto de EG Bern), →Hans Hunkeler (prezidanto de SAEF), →Werner Laederrach (prezidanto de SES), Martin Meyer (Zuriko), →René William Perrenoud (sekretario de ES Neuchâtel), →Johannes-Jakob Stur-

zenegger (komitatano kaj reprezentanto de la ĝeneva serva centro de UEA, svisa delegito de ISAE), →Olivier Tzaut (prezidanto de EES), Jean Waldvogel (Neuchâtel) kaj Johannes Jüstrich (kasisto de EG St. Gallen).



Claude Gacond, Jean-Jacques Lavanchy, August Braun



August Braun, René-William Perrenoud, Gabrielle Gacond

Longe oni diskutis pri la principoj, la organiza statuso kaj la nomo de la estonta instalaĵo mem. Ekzemple Martin Meyer proponis la titolon Internacia-Kultur-Centro sen mencii Eon, ĉar oni nur agu per Eo por doni al ne-esperantistoj okazon kunlabori. La vorton 'esperantista' li ne deziris, ĉar laŭ li ĝi rilatas al profesieco kaj ni ne estas *e-istoj*, sed ni estas *esperantanoj*. Post kontraŭargumentado kaj arda defendo de la titolo Kultura Centro Esperantista fare de Gacond, la ĉeestantoj reprenis siajn alternativajn proponojn. Laederach, prezidanto de SES, konfesante, ke en SES oni antaŭe ne diskutis pri la propono starigi K., persone esprimiĝis favore al la projekto, se ĝi ne estas konkurenco por SES, kaj atentigis pri la financa risko de la tuta entrepreno. Oni opiniis, ke fakte K. povus esti la motoro por eliri la stagnan situ-

acion, en kiu troviĝas la Eo-movado. Kiel provizora CK de K. estis elektita →August Braun (1915-85), →René-William Perrenoud (1905-96), librotenisto de K. ĝis 1988, kaj →Claude Gacond (*1931), kiu rolis kiel sekretario de la kunveno kaj kiu verkis detalan protokolon, kiu estas konservita en CDE-LI.

Baza celaro de K.: Laŭ la protokolo dum la fondkunveno de K. estis menciitaj jenaj celoj, kiujn la nova institucio plenumu: organizi kursojn, seminariojn, kolokvojn, kulturajn manifestaciojn; reprezenti Eon en plej diversaj kulturaj medioj; rilati kun instru-instancoj kaj kun Unesko; helpi la e-istajn societojn, kiuj deziras intensigi sian kultural aktivecon kaj altigi sian kultural nivelon; fondi Eo-societojn en la urboj, kie ne ankoraŭ ekzistas e-ista vivo; starigi stud-rondojn en plej diversaj medioj; peradi por la internaciaj Eo-societoj, kiuj ne ankoraŭ havas sidejon, reprezentantojn, sekciojn aŭ delegitojn en Svislando; favorigi kontaktojn inter la svisaj Eo-societoj mem kaj inter la e-istaj kaj ne-esperantistaj societoj por diskonigi la Eokulturon; starigi fakajn organojn por difinitaj kulturaj aktivecoj; disponigi nediskriminacian forumon al seriozaj kulturaj agantoj per Eo, kiuj ankoraŭ ne estas oficiale ligitaj al e-istaj organizoj.

Organoj: Laŭ la protokolo de la fondkunveno K. konsistas el la sekvantaj laŭstatutaj gvidorganoj: ĝenerala asembleo (jarkunveno), direkta komitato (kun prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario aŭ direktoro), financa komisiono, kaskontrolantoj, kultura komisiono).

K., kiu laŭ la ĉaŭdefona gazeto *L'Impartial* (2.12.1988) havis la ambicion fariĝi iusence *Le Macolin d'espéranto*, komprenis sin kiel institucion, kies celoj baziĝas sur strikta neŭtraleco politika kaj religia, kadre de la Universala Deklaracio de homaj rajtoj kaj konforme al la zamenhofa neŭtraleco de la Eo-movado. Fakte estis antaŭvidite, ke K., kiam →Gastejo Edmond Privat (GEP) reale posedos la sep domojn, kiujn ĝi celis akiri, fariĝos la sidejo de la Instituto Internacia Edmond Privat.



Claude Gacond, August Braun, Mireille Grosjean

Statuso de K.: Claude Gacond dekomence volis eviti, ke K. estu societo kun membroj, sed prefere institucio kun ĝenerala jarkunveno kiel supera instanco. Due: en komparo ekzemple kun la oficiala privata lernejo La Grande Ourse, kiu laboras kadre de la deviga instruado kun la devo obei al la instruplanoj de la ŝtato kaj pro tio estas sub la kontrolo de la ŝtato, K. havis la statuson de neoficiala privata lernejo, kiu laboris ekster tiu deviga lerneja kadro, instruante do neoficialajn fakojn, kaj sen esti submetita al la kontrolo de la plenumenda instruplano. K. havis rilatojn kun Svisa Federacio de privataj lernejoj, dum pluraj jaroj eĉ membris en ĝi. Kiel respondeca direktoro de K. Claude Gacond estis regule invitata al oficialaj renkontoj ekzemple kun la direktoroj de aliaj lernejoj publikaj kaj privataj en la kantono Neuchâtel. Tiuj kontaktoj estis tre utilaj por la diskonigo kaj respektigo de Eo en la kantono; post 1994 tiuj rilatoj bedaŭrinde ĉesis.

La specifa statuso de K. ebligis trovi la necesan apogon de la urbaj instancoj, por ke instaligu vojmontriloj en la urbo ktp.

Laborplano de K.: Por la periodo 1988-91 K. ellaboris ampleksan kaj detalan laborplanon kun la sekvantaj fundamentaj elementoj kaj celoj (elekto): eldono de nacilingvaj informiloj kaj dokumentaro pri Eo, de aŭd-vida inform-materialo, realigo de porgazeta informado, lanĉo de refutservo por reagi kontraŭ la artikoloj aŭ elsendoj misinformaj pri Eo, starigo de ekspozicio pri Eo kaj interlingvistiko en Svislando. Inter la ĉefaj servoj estas menciindaj la libro-servo, korektada servo (por helpi al e-istoj, kiuj havas lingvajn demandojn), ekzamena komitato, organizado de restadoj, seminarioj, kursoj, renkontiĝoj kaj kulturaj semajnfinoj, studrondoj. Parton de la laborplano formis ankaŭ la funkciigo de

Internacia Feria Altlernejo (IFA). Konscianta, ke la aktualaj financaj kaj limigitaj homaj rimedoj de K. ne ebligis tute kontentige realigi tiujn planojn, la laborplano antaŭvidis kreskigi siajn financajn rimedojn i.a. pere de patronaj komitatoj, kies taskoj estas alporti apogon por la serĉado de subvencioj. Kiel aliaj ĉefaj celoj en la laborplano estis fiksita la lanĉo de publika agado por Eo (*Pro Esperanto*), la verkado de perkorespondaj kursoj, la eldono de publikaĵoj sub la titolo *Studoj*, la konstruado de GEP kaj la funkciigo de *Kampanjo Eo lernejen* por akceli la enkondukon de la instruado de Eo en la lernejojn. Antaŭviditaj de la laborplano estis krome kursoj por blinduloj kaj diversaj poresperantaj kampanjoj, kiuj trafu precipe la junularon, triaĝulojn, turistojn, la komercon kaj industrion.



Norda flanko de KCE/GEP, strato Postiers 27 (domo Naville) kaj 29 (Bovet) (fotis A. Künzli)

Instaliĝo en la Neŭŝatela Ĵuraso kaj plua evoluo: La unua sekretario de K. ekfunkciis en la vilaĝo La Sagne/NE apud La Chaux-de-Fonds, en la privata domo de Claude kaj Andrée Gacond (Miéville 133). Kvankam jure kaj finance separita, sed tamen nedisi-

geble ligita kun → *Gastejo Edmond Privat (GEP)*, fondumo starigita ekde 1974 por disponigi oficejojn kaj kursejojn kaj por loĝigi siajn klientojn, K. dekomence dependis de la malavara donacemo flanke de la e-istaro kaj de la apogemo de simpatiantoj. Tiumaniere povis esti rikoltitaj ne malaltaj sumoj (→ *Monata Cirkulero* regule raportis prie). Sed baldaŭ oni devis konstati, ke ili neniel sufiĉas por reale kovri la plej diversajn elspezojn, kiujn kaŭzis la funkciado de la tuta entrepreno. Do grandparte la oficoj en K. devis resti honoroficaj, la laboro amatora.



E-istoj ĉe KCE: Edwin Thomas, Claude Gacond kaj Herbert Mayer



Ŝildoj: inter la domoj de KCE kaj iama bushaltejo 'Gymnase Espéranto' (fotis A. Künzli)



E-istoj ĉe KCE: Alfred Wenger, lia edzino kaj e-istino el Francio



Claude Gacond, UEA-prezidanto Grégoire Maertens kaj Ivo Lappenna dum la inaŭguro de la KCE/GEP-domo Hodler en 1983

Aliflanke impresa nombro de bonvolaj helpantoj kaj simpatiantoj kontribuis digesti la pli kaj pli ampleksan laboron, kiu atendis ilin en semajnfinoj de la bona volo, dum vesperoj, ferioj, en la libertempo. Inter la bonvoluloj menciindas ekzemple Pierre Berger, arkitekto en La Chaux-de-Fonds, kaj John Thum, farbisto en Les Brenets (kiuj pretis senpage disponigi sian metian arton), →Andres Bickel (GE), →Claude kaj Nicole Piron (VD), →Giorgio Silber kaj →Perla Martinelli (reprezentantoj de Kooperativo de →Literatura Foiro), →Olivier Tzaut (Mont-Soleil/BE), →Henri Vatré (GE), Andrée Gacond (libroservo de K.), *Jean-Jacques Lavanchy* (VD, prezidanto de K. kaj de Komisiono Eo lernejen), Arlette di Vetta (GE, sekretariado), Lucienne Dovat (VD, instruado de la Rika metodo), Jacqueline Vasserot, Françoise Badoux, →Nicole Margot →David Buhlmann kaj Nicolas Greber (ĉiuj VD), Marie-Louise Münger (NE), Ardachès kaj →Madeleine Stakian (GE), Jean-Daniel Bo-

sko (GE), →Tazio Carlevaro (TI/NE), →Erna Döring (BS), István Mórocz (ZH), →Daniel R. Mühlemann (AG/VD), →Andreas Künzli (LU) k.m.a. Kiel helpsekretario de K. surloke iam laboris ankaŭ la grizon-devena e-isto Edwin Thomas (1935-84). *Stefano Keller* (*1953), hungar-devena psikopedagogo, kiu instruadis Eon en K. kaj en la 1980aj jaroj reprezentis UEAn kiel delegito en La Chaux-de-Fonds, ankaŭ fake okupiĝis pri Eo en la Tria Mondo kaj pri turismo kaj tiucele veturadis al Ŝri Lanko.



Giorgio Silfer instruas en KCE



Giorgio Silfer, Claude Piron kaj Tazio Carlevaro

Signifaj esperantologoj, kiel Ed Borsboom (Nederlando), Reinhard Haupenthal (Germanio), Herbert Mayer (Aŭstrio), István Szerdahelyi kaj Ilona Koutny (Hungario), Walter Źelazny (Pollando/Francio) k.a. regule restadis en K. por prelegi aŭ gvidi kurson. Herbert Mayer, nuna direktoro de la Internacia Eo-Muzeo en Vieno, staĝis che KCE por redakti perkorespondan kurson por la germanlingvanoj.

Do centoj da svisaj kaj eksterlandaj gastoj kaj kursanoj restadis en La Chaux-de-Fonds por partopreni la aktivecojn de K./IFA kaj GEP kaj lerni Eon en la Neŭŝatela Ĵuraso. Kelkmiloj da personoj, svisaj kaj eksterlandaj, ricevis la informojn pri K. kaj pri la ebloj lerni Eon kaj lertiĝi per Eo. Tial K. plenumis ne nur eksterordinare gravajn klerigan, didaktikan kaj socian funkciojn en la Eo-movado, sed transprenis samtempe la propagandan rolon, kiun verdire SES kiel Landa Asocio de UEA devintus pli aktive ludi, sed ofte neglektis.

Laŭ klarigo de Gacond K. servis kiel modelo por Kvinpetalo en Bouresse (Francio).

Eldonaĵoj de K.: Aperis →*Monata Cirkulero* sub la redaktado de Claude Gacond ĝis 1990 (entute 187 eldonoj), poste ĝi estis redaktita de la K.-stabo kaj de Andreas Künzli (n-ro 199/1993 ĝis n-ro 204/1994). Ekde 1995 ĝis 1999 la informilo portis la titolon *Che la Dompato*.

Sporade aperis la nacilingvaj informiloj *L'essor de l'Espéranto*, *L'espéranto à l'école* (franclingva), *Esperanto-Forum* (germanlingva) kaj *Lo sviluppo dell'Esperanto* (itallingva). Krome aperis *Studoj de K.* kaj estis ellaborita la *Perkoresponda Kurso Programita* por franc- kaj germanlingvanoj. Ĝia ĉefa celo estis pretigi la lernantojn al la akiro de la IFA-diplomoj. La libroservo de K. apartenis al la plej bonaj kaj ampleksaj Eo-librovendejoj de la Eo-movado.



Olivier Tzaut, Jean-Jaques Lavanchy kaj Lucienne Dovat




Olivier Tzaut kaj Stefano Keller



Ivo Lapenna en KCE, plej dekstre: Giorgio Silfer

Aliaj aktivecoj kaj organoj de K.:
Internacia FERIA Altlernejo (IFA): Temas pri faka organo de K. kun la celo konstrui memstaran altlernejon por la e-istoj kaj kunordigi la klerigan-sciencan programon de K., sur kies bazo eblas studi kaj praktiki en larĝa senco la principojn de la e-ismo, homaranismo, mondanismo, federalismo ktp. pere de la uzado de la lingvo Eo. Kiel priskribite supre, la ideajn sugestojn kaj imagojn por tiu projekto provizis →Edmond Privat jam komence de la 1960aj jaroj kaj antaŭe. La unua sesio de IFA disvolviĝis en 1979 sub la kunordigado de →Giorgio Silfer. Ĝia unua rektoro estis →Claude Piron, kiu retiriĝis en 1980. →Tazio Carlevaro, kiu dum 1975-78 vivis kaj laboris en la kanton Neuchâtel, servis kiel vicedestro. La ŝanĝo de la nomo de IFA al Internacia Perfektiga Altlernejo ne populariĝis en la konscio de la klientoj de K. kaj nelonge estis praktikata. Postaj klopodoj revivigi IFAn mem ne plu estis sukcesaj.



Nicolas Greber – iama kuiristo de KCE/GEP



Brunetto Casini kaj Claude Gacond

Komisiono Esperanto lernejen (L'Espéranto à l'école): Ĝi estis laŭstatuta faka organo kaj integra parto de la laborplano de K. kaj aktive funkciis kiel kampanjo en la 1970-80aj jaroj, anstataŭante la agadon de EES. Ĝiaj ĉefaj celoj estis akceli la enkondukon de Eo en la lernejojn kaj sisteme informadi la kantonajn instru-departementojn, la instruistojn kaj instruontojn de la porinstruistaj lernejoj, la politikistojn, okazigi Eo-kursojn sub la aŭspiciado de la instru-departementoj kaj instruistaj organizaĵoj, formi kantonajn komisionojn, kiuj apogas la kampanjojn, instigi eksperimentojn pri la instruado de Eo en lernejoj ktp. La ĉefaj motoroj de la kampanjo estis ĉefe la svisaj Eo-instruistoj kaj -edukistoj, kiuj antaŭe aktivis kadre de EES (→Instruado), inter ili →Claude Gacond, →Olivier Tzaut, Jean-Jacques Lavanchy (ĉiuj instruistoj) kaj →Werner Laederach. En 1974

la prezidanto de la komisiono estis → Maurizio de Sassi. Dum la 70aj jaroj ankaŭ Heinrich Matzinger (1898-1984), instruisto (1929-62) pri skribado kaj → stenografio ĉe la kantona komerca lernejo de Zuriko, apartenis al la Komisiono Eo lernejen de K.



Direkta komitato de KCE fine de la 1980aj / komence de la 90aj jaroj: staras Fritz Wassmann kaj Ueli Hänni, sidas Mireille Grosjean-Robert, Claude Gacond kaj Norbert Martin.



Kultura Komisiono de K.: Organo de K., kiun ĝia statuto de la 15a de decembro 1968 difinis jene: Ĉiu Eo-institucio, kiu plenumas la kondiĉojn de la statuto de K., rajtas havi delegiton kiel membron A de la Kultura Komisiono. Institucio estas konsiderata e-ista, se ĝia statuto mencias Eon, ĉu kiel oficialan laborlingvon, ĉu kiel unu el la laborlingvoj. Ĉiu institucio, kies sidejo troviĝas en Svislando, rajtas elekti unu delegiton kiel membron A de la Kultura Komisiono. La samo validas por eksterlandaj organizoj. Ĉi tiu regularo donis kaj al svisaj kaj eksterlandaj e-istoj la eblon kunformi la aktivecon kaj politikon de K., kiu kvankam laŭjure estante svisa societo, celas malfermi sin ankaŭ



Grupo kun Alfred Wenger, Claude kaj Nicole Piron, Marie-Louise Münger k.a.

internacie. Al tiu komisiono apartenis/as ekzemple la svisaj e-istoj Arthur Baur, Tazio Carlevaro, Lucienne Dovat, Jean-Jacques Lavanchy, Giorgio Silfer kaj Perla Martinelli, Nicole Margot, Claude kaj Nicole Piron, Marc Rohrbach, Henri Vatré, sed ankaŭ alilandanoj kiel Ed Borsboom (Nederlando), François Degoul (Francio), István Ertl, Ilona Koutny, Stefan MacGill (Hungario), laŭ konsisto en junio 1989.

Agado Pro Esperanto: Ĉi tiu celo kiel integra parto de la laborplano de K. detaliĝis jene: promocio de la 2a de junio (aŭ alia tago) kiel Eo-Tago. Dum tiu Eo-tago oni kontaktas la publikon per surstrataj agadoj, ekzemple per la disvendado de broŝuretoj, kiu allogu la intereson de la publiko al la subteno de Eo tra K. kaj ties kunlaborantaj medioj. La profito de la agado Pro Esperanto apartenas je po duone al la salajra fonduso de K. kaj al la celoj menciitaj dorsflanke de la postĉekpagilo, i.a. por la sekretaria laboro.

Financa krizo kaj gravaj ŝanĝoj: Jam en la fondotempo, la responsuloj de K./GEP emfazis, ke ilia eksperimento povos sukcesi nur, se alfluos sufiĉe multaj financaj rimedoj de la e-istaro kaj se la necesa apogo (subvencioj) de politikaj instancoj estas garantiata. Ankaŭ en la fonduma konsilio de GEP oni konsciis pri la financaj riskoj lige kun la aĉeto de la senmoveblaĵoj. Bedaŭrinde la esperitaj subvencioj de ŝtataj instancoj ne venis kaj la espero, ke K./IFA kiel Eo-altlernejo estos oficiale agnoskita de la kantono, ne plenumiĝis. Sed K. kvazaŭ plene dependis de la

propra Eo-komunumo, por kiu la lokaj publikaj instancoj tamen montris intereson. Do K. kaj GEP restis la privata projekto de idealistoj, sendube ne naivaj, sed probable super-taksintaj la gravecon de sia verko en la 'makrosocio'.



Profesie produktita kursprogramkajero en 1993, kiu samtempe montras la oficialan siglon de KCE

Fine de 1990 *Mario Bélisle* (*1961), kiu venis el Kanado al La Chaux-de-Fonds, ricevis la taskon kiel administra komisiito de GEP/K. prezenti detalan analizon pri la financa stato de la institucio. Ĉi tiu kalkulado de la financoj de GEP kaj K., kiuj estis finance intime interplektitaj, evidentigis grandegan malekvilibron inter aktivoj kaj pasivoj en la librotenado. La krizo de GEP fariĝis samtempe la krizo de K. kaj inverse. Por solvi la financajn problemojn kaj reekvilibrigi la bilancon, la fonduma konsilio de GEP decidis vendi minimume kvin domojn. (→Gastejo Edmond Privat)

En 1991 Claude Gacond emeritiĝis el sia duontempa funkcio de nesalajrita direktoro de K.. La FAME-fondaĵo (Aalen, Germanio)

aljuĝis al li sian unuan premion. La ricevitaj 10'000 germanaj markoj estis dividitaj po duone inter K. kaj CDELI.



Bushaltejo en La Chaux-de-Fonds: Gymnase-Espéranto (la Eo-titolo malaperis en la 90aj jaroj)



Ŝildo de la iama bushaltejo en La Chaux-de-Fonds (fotis A. Künzli)

La programo de K. portempe estis ĉesigita, la nova komitato decidis rezigni pri la gastigado de kursanoj. Post provizora interrompo de la aktivecoj, en 1992, interkonsulte kun la fonduma konsilio de GEP, la direkta komitato de K. sub la prezido de *Mireille Grosjean* (*1946) ricevis la taskon riski novan starton por la centro per iom refreŝiĝinta koncepto. Salajritaj dungitoj (*Mario Bélisle*, *Benjamin Chamboudez*, poste →*Andreas Künzli*, *Guillaume Lanier*, *Ahmed Améziane*) zorgu pri kiel eble plej efika plenumado de la laboro kaj allogo denove pli vastan celpublikon por la aranĝoj de K. Kiam post du pliaj jaroj evidentigis, ke malgraŭ la intensaj klopodoj generi aktivecojn kaj enspezojn, la financa situacio ne pliboniĝis, necesis serĉi novan kaj drastan solvon. La ĝisnuna direkta komitato de K. demisiis, la oficistoj estis maldungitaj, la librotenado de GEP estis separita de tiu de K. Al publika alvoko en →*Monata Cirkulero* savi K./GEP respondis aktivuloj identaj kun tiuj de Kooperativo de Literatura Foiro, kiuj ekde januaro 1995 transprenis la gvidadon.

Nova prezidanto de K. do fariĝis →*Giorgio Silfer* (*1949), kiu estis helpata de →David Buhlmann, Georges Lagranges (Francio), Marco Picasso (Italio), kaj Jaqueline Vasserot (Svislando). En 1997 la prezidanta torĉo de K., kiu prezentis sin al la publiko sub la titolo *Ĉe la Dompago*, transiris de Giorgio Silfer al Buhlmann mem (kiu en 2003 ekzistis el la komitato de K.).

La ĉefa celo de la disiga procezo inter K. kaj GEP do estis por ambaŭ organizoj serĉi solvon de la financaj problemoj kaj senŝarĝigi de la ŝuldoj al kreditantoj. La asocio K. estis daŭrigita. Por ŝpari salajrojn ekdeĵoris volontuloj (Judit Felszeghy, poste Anna Lászay el Hungario). En junio 1995 K. raportis, ke post 14 jaroj sen statutmodifoj ĝi ricevis novan statuton. Malaperis la posteno de la direktoro, kies respondecojn transprenis la komitato, reduktiĝis la povoj de la komitato vidalvide de la asembleo, difiniĝis la rolo de la kultura konsilio. La komitato fariĝis simila al plenumorgano. En la statuto malaperis ankaŭ la mencio pri GEP, al kiu K. ne plu havas devontigojn, dum restis devontigoj de GEP al K., laŭ la statuto de GEP mem.

En januaro 1997 la fonduma konsilio de GEP decidis, ke ĝi pretas vendi la du lastajn domojn al K. kontraŭ la transpreno de la ŝuldoj. En oktobro la komitato de K. reviziis sian oferton, nome ke K. pretas aĉeti nur unu domon (Postiers 27), dum ekzistis la intenco vendi la duan domon Bovet (Postiers 29) al la plej alloga aĉetanto (detalojn vd. →Gastejo Edmond Privat). Dum la fondumo GEP mem ne plu estis bezonata kaj likvidita en januaro 2001, la domo Naville daŭrigis kiel posedaĵo de la asocio K. sian funkcion kiel administrado de K. kaj de aliaj 'establoj' sub la influo kaj kontrolo de Silfer kaj ĉirkaŭaĵo. Kiel kultura centro e-ista K. pli kaj pli perdis sian originan dinamikon kaj signifon. En 2003 nova prezidanto de K. fariĝis →*Daniel R. Muhlemann* (*1950), kiu loĝas en Nyon/VD.

Andreas (Andy) KÜNZLI

*1962. Loĝas en Bern



K. vizitis la bazajn lernejojn en Lucerno kaj Kriens/LU, la duagradan en Kriens kaj la gimnazion en Sarnen/OW kaj Lucerno (abiturienta ekzameno en 1983). Armea deĵoro en alpaj fortikaĵoj artileriaj. Poste li studis slavan filologion (slavistikon), orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato (licencia ekzameno en 1992). Lia universitata diplom-verkaĵo, kiu ricevis Stipendion Lapenna, traktis la temon *Interlingvistiko kaj Eo en la Cara Imperio kaj en Sovetunio*. Lige kun siaj studoj K. vizitis diversajn orienteŭropajn landojn kaj restadis en tiama Sovetunio (1988/9). Liaj tri profesiaj agadkampoj estas filologio-historio, interlingvistiko kaj informadiko (diplomo de retfakulo en 1998).

Kvankam K. jam en pli fruaj jaroj eksciis pri Eo, kiun li lernetis pro lingva intereso, li fariĝis e-isto finfine en 1979 instigite de la 64a UK en Lucerno, dum kiu la gimnaziano rolis kiel libervola asistanto en la gazetara servo. Samtempe li aliĝis al la lucerna ES, kies estrarano li restis ĝis 1992, fondante la societan organon *La Lucerna Progreso*, kiun li redaktis ĝis 1985. 1982-83 la iama ano de SEJ (poste JES) estis komisiito de SES pri junularo, 1984 pri rilatoj kun KCE, 1984-86 pri la preparado de la jubilea jaro. 1986-94 li estis (ĝenerala) sekretario de SES. 1986-92 li estis (pagata) redaktoro kaj parolisto de la Eo-fako de Svisa Radio Internacia (SRI). 1990-94 li membris en la fonduma konsilio de GEP, 1991-93 li estis vicprezidanto de KCE, 1993-94 plentempa (salajrata) sekretario de KCE, kie li trapasis ankaŭ la superan ekzamenon de ILEI/UEA.

Sur la internacimovada nivelo, 1980-93 K. aktivis en TEJO (en 1982 kiel komitatano, 1985-91 kiel ĉefredaktoro de *TEJO-tutmonde*, 1990-93 kiel provizora sekretario, vicprezidanto kaj estrarano pri landa agado de TEJO). En novembro 1991 li organizis kun TEJO en La Chaux-de-Fonds seminarion pri la temo 'Neŭtraleco – ĉu alternativo al ideologioj'? K. vizitis plurajn IJK, UK kaj aliajn aranĝojn kaj ofte vojaĝas, precipe tra orienteŭropaj landoj, kie li kontaktas lokajn e-istojn aŭ prelegas. K. redaktis la politikan rubrikon de *Monato* (1991-93), krome pri-zorgis, kun aliaj, la kongresan bultenon de la krakova IJK (1987), gvidis la radioservon de la zagreba IJK (1988) kaj kunredaktis la kongresan kurieron de la havana UK (1990), krom tio li verkis/as artikolojn por diversaj Eo-periodaĵoj kaj festlibroj. Interlingvistike interesata li estas membro de Gesellschaft für Interlinguistik (GIL, Berlin, ekde 1995), fakdelegito de UEA kaj konsilanto de CDELI (informadiko, interlingvistiko, slavistiko); iam li membris ankaŭ en aliaj organizaĵoj (AIS, IKEL k.a.). De 1997 li oficas kiel reprezentanto de UEA ĉe UN Ĝenevo, kie de tempo al tempo li vizitas kunsidojn. La 28an de aprilo 1998 li organizis kun UEA en la Palaco de Nacioj datrevenan simpozion pri la temo 'Lingvo kaj Homaj Rajtoj', sub la aŭspicio de UN-komisiono pri homaj rajtoj (UNCHR). En 1992 K. komencis kolekti la materialon por *Svisa Enciklopedio Planlingva*.

→Lucerno →Junularo →Svisa Esperanto-Societo
 →Radio →KCE →CDELI →Ekspozicioj
 →Literaturo →Bibliografio

KURIERO DE ESPERANTO

Organo de Esperanto-Societo Basel (ESB). Aperis inter 1981 kaj 2000. Fondinto kaj unua redaktoro: →Erna Döring; de 1989 redaktis ĝin Nicole Bérout-Focke. Entute aperis 80 numeroj.

→Bazelo →Bibliografio (gazetaro)

Hans Hermann KÜRSTEINER

1885-1968



K. vizitis la superan komercan lernejon kaj fariĝis komercisto-prokuristo en broda firmao, poste oficisto en asekura societo en St. Gallen.

Kiel svisa Eo-pioniro de ĉ. 1908 K. kunfondis EG St. Gallen (1909), en kiu li okupis la gvidajn funkciojn de prezidanto kaj sekretario dum pluraj jardekoj, li estis ankaŭ UEA-ĉefdelegito de Svislando (1934-36). Kiam dum la UEA-IEL-skismo (1936-47) ekvakis la posteno de la prezidanto de la malnova UEA, li akceptis ĝin en 1941 post longa hezitado kaj restis en tiu ofico ĝis 1947. Samtempe li estis ano de la defenda komitato de UEA. En ĉi tiu jaro, okaze de la 32a UK en Berno, li esence kontribuis al la reunuigo de UEA kaj IEL. Dum la dua mondmilito li organizis kun →Hans Jakob kaj la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco (IKRK) la helpkaj serĉadoservon por e-istoj. Tiel oni povis apogi la zamenhofan familion pluvivi en la varsovia geto. Dum la dua mondmilito K. admonis la e-istojn tra *SE* ne adapti sin laŭ unu el la regantaj mondkonceptoj, ĉu faŝista, ĉu bolŝevista. K., kiu kunlaboris kun la redakcio de *EdEo* (1933), gvidis multajn Eo-kursojn kaj gastigis sennombrajn vojaĝantajn e-istojn. Spite al diversaj movadaj seniluziigoj li ne rezignis pri siaj taskoj kaj postenoj. Tion la Eo-movado dankis al li, nomante lin honora membro de SES (1937), honora prezidanto de EG St. Gallen kaj de UEA (1947). En sia multflanka laboro K., kiu estis ankaŭ ano de KELI, estis fidele apogata de sia edzino *Anna Strübi* (1891-1968).

→St. Gallen →SES →UEA